

# ESPERANTOLEHTI



Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ huhtikuu ♦ aprilo ♦ 2/2017



La aprila numero de la revuo  
Esperanto elŝuteblas senpage, p. 16

- ♦ Nova ĉefdelegito de UEA en Finnlando, p. 4–5
  - ♦ Somera kurso – Kesäkurssi, Rauma, p. 6–7
- ♦ La vivoverko de Zamenhof daŭre inspiras, 100 jarojn post lia morto, p. 9
  - ♦ Syyspäivät, Aŭtunaj Tagoj 9.–10.9.2017, p. 13

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.

Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

Originajn tekstojn eblas reaperigi kun indiko de la fonto.

Alkuperäiset tekstit ovat uudelleen julkaistavissa lähdemaininnan kanssa.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo:** ✉ [eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi)

Päätoimittaja/Chefredaktör/Cefredaktoro: *Robert Bogenschneider*

Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ [brilanto@gmail.com](mailto:brilanto@gmail.com)

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ [maj-lis@maisinpaja.info](mailto:maj-lis@maisinpaja.info)

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

**Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 25 €/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu la antaŭlastan paĝon

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

☎ 044 264 2742 ✉ [eaf@esperanto.fi](mailto:eaf@esperanto.fi)

**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmogatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

**Pankkitili/Bankkonto:** FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

**Julkaisija/Utgivare/Eldonanto:** Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

**Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto:** 300

**Kansi/Pärm/Kovrile:** Tusilago / Leskenlehti. Foto/Kuva: *Maj-Lis Krouvi*

## Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 ✉ [eafprezidanto@esperanto.fi](mailto:eafprezidanto@esperanto.fi)

**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ [paivi.saarinen@iki.fi](mailto:paivi.saarinen@iki.fi)

**Sekretario/Sihtööri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ 050 549 4709 ✉ [eafsekretario@esperanto.fi](mailto:eafsekretario@esperanto.fi)

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**

*Robert Bogenschneider*, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 ✉ [brilanto@gmail.com](mailto:brilanto@gmail.com)

*Tiina Kosunen*, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ [tiina.kosunen945@gmail.com](mailto:tiina.kosunen945@gmail.com)

*Arja Kuhanen*, Saratie 2, 31300 Tammela. ✉ [kuhanenarja@gmail.com](mailto:kuhanenarja@gmail.com)

*Paula Niinikorpi*, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ [paula.niinikorpi@gmail.com](mailto:paula.niinikorpi@gmail.com)

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**

*Tapani Aarne*, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 524 5823 ✉ [tapani.aarne@mbnet.fi](mailto:tapani.aarne@mbnet.fi)

*Börje Eriksson*, Kulmakatu 10 A 6, 15140 Lahti. ☎ 040 779 3487 ✉ [bovoeo73@gmail.com](mailto:bovoeo73@gmail.com)

*Miamaria Saastamoinen*, ☎ 050 32 89 612 ✉ [miamaria.saastamoinen@gmail.com](mailto:miamaria.saastamoinen@gmail.com)

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ [eafkasisto@esperanto.fi](mailto:eafkasisto@esperanto.fi)

**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:** FI44 5630 4550 0426 25 OKOYFIHH

(UEA/EAF Paula Niinikorpi) Adreson vidu supre. / Katso osoite ylhäältä.

**Officejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.

☎ 044 264 2742 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo ✉ [eaf@esperanto.fi](mailto:eaf@esperanto.fi)

**Internet:** [www.esperanto.fi](http://www.esperanto.fi) ♦ [www.facebook.com/Finnlando](https://www.facebook.com/Finnlando) ♦ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/finnlando

## Cent jaroj de Finnlanda sendependeco



**L**a finnlingva ĉefartikolo en nia antaŭa numero temis pri la jubilea jaro 2017 de Finnlando, cent jaroj de sendependa ŝtato. Niaj sudaj najbaroj festos venontan jaron 2018; la orienta kaj okcidenta najbaroj ne festas sian sendependiĝon, ĉar ili konsideras sin deoriginaj ŝtatoj. Sendependiĝo de ”ĉerandaj” popoloj kiel la finnoj kaj la ĉebaltaj estis rezulto de longa procezo, komencinta longe antaŭ la ”naskiĝtago” kaj daŭranta – plue, certe tra krizoj sed espereble sen konfliktoj.

Ĉijare oni festas la centan datrevenon de la respubliko Finnlando. Estas decidite, ke la ”naskiĝtago” estu la 6-a de decembro. Tiudate en 1917 la landa parlamento aprobis anoncon pri la senata (registara) decido de la 4-a de decembro, ke Finnlando estu suverena respubliko. La parlamento nomumis la senaton en la 27-a de novembro sen peti aprobon de la Ruslanda registaro (Finnlando estis grandduklando en la Rusa imperio, sed la imperiestro-grandduko jam malaperis). Iu ajn el la tri menciitaj datoj do povus esti sendependiĝa datreveno, same kiel du tuj sekvintaj: la 31-an de decembro la Ruslanda bolŝevika registaro subskribis dokumenton pri ekŝiĝo de Finnlando, kaj la 4-an de januaro 1918 la Centra komitato de sovetoj ĝin aprobis. Estis petita kaj ricevita rekono de suverenece kiel ĉe eksterlando. Tio estis konsekvence, ĉar jam la 18-an de julio 1917 la Finnlanda parlamento aprobis leĝon pri plej alta decidpovo, do alproprigis enlandan suverenecon. Tiu tago povus esti la festa malgraŭ tio, ke la provizora registaro de Ruslando tiam dissolvis la parlamenton. Sed la nove elektita parlamento rekonfirmis la leĝon la 15-an de novembro sen ia rezervo pri aprobo flanke de Ruslando; do tiu dato povus esti la plej adekvata kiel komenco de nia ŝtata sendependeco.

Estus eble proponi ankaŭ multajn pliajn datojn de sendependiĝo, almenaŭ dudekon.

En Finnlando estis de januaro ĝis majo 1918 du registaroj, la senato kaj socialista ribela ”popola delegitaro” kaptinta kontrolon de la suda parto de la lando. La senato fuĝis norden al *Vaasa* en Ostrobotnio, *Helsinki* restis la ”ruĝa” ĉefurbo. Sekvis civila milito, dum kaj post kiu pereis tride mil homoj. La senatan venkon sigelis norde en *Tampere* la senata armeo kreita kaj komandita de generalo *Carl Gustaf Mannerheim* farinta sian ĝistiaman karieron en la Ruslanda cara armeo. La spino de la senata armeo estis bataliono de finnaj aktivistoj revenintaj el Germanio, tien irintaj por trejniĝi por eventuala liberiga milito. Ili ne atendis civilan konflikton. (Tiu bataliono, cetere, longe garnizonis en *Liepāja* (Libau), Latvio, urbo de la ĉijaraj Baltiaj Esperanto-Tagoj 1.–8. de julio; dum la Tagoj oni aŭdos prelegon pri tiu historio kaj alian pri populara finna teatraĵo lige kun tiu historio.) – En la sudo germanaj trupoj sub gvido de generalo *Rüdiger von der Goltz*, komandanto de la t.n. Baltmara divizio, invitetaj de la senato konkeris *Helsinki*. Von der Goltz restis en Finnlando kaj lasis la landon kun siaj trupoj revenante al Baltlandoj nur post la kapitulaco de Germanio en novembro 1918. Li daŭrigis la batalon kontraŭ sendependiĝaj fortoj de Estonio kaj Latvio – samkiel rusoj, kaj bolŝevikoj kaj blank-armeoj – ĝis sia malvenko kontraŭ estonoj ĉe *Cēsis* la 23-an de junio 1919, kiun daton niaj sudaj amikoj plenrajte festas kiel sigelon de sendependeco. Kaj fine, la 14-a de novem-



bro 1920, la packontrakto de *Tartu* difininta la limojn de Finnlando estis farita preskaŭ precize tri jarojn post la leĝo pri suvereneco.

En tiu ĉi jaro do estas multaj datoj por prime-mori, sed ĉiujn prifesti estus neoportune. Do la sesa de decembro estu kaj restu la elekto, sed konsciata estu la tuta procezo – kaj tio, ke ĝia komenco ne estas difinebla kaj finon ĝi ne havas.

Ŝtato cent jarojn, sed popolo kaj ĝiaj kultu-raj aspiroj ĉiam. Esperanto-Asocio de Finnlan-

do kompletigas siajn 110 jarojn la 28-an de ap-riilo ĉijara, kiu okazas esti vendredo de longa semajnfino ĝis la unuamaja lundo. Taŭgaj ta- goj por gaje prifesti *Nino Runeberg*, *Vilho Se- tälä*, *Werner Anttila* kaj aliajn pionirojn, kiuj jam antaŭ 120 jaroj ekkonis la lingvon! Kaj laste sed ne balaste atenti la 26-an de julio 1887. Cent tridek jaroj de Esperanto.

*Tuomo Grundström*

## Nova ĉefdelegito de UEA en Finnlando – UEA:n uusi pääedustaja Suomessa

Okazis ŝanĝo de la UEA-ĉefdelegito en Finn-lando. La oficperiodo de la antaŭa ĉefdelegito *Päivi Saarinen* finiĝis kaj *Paula Niinikorpi* es- tis elektita nova ĉefdelegito por la sekva trijara oficperiodo.

*UEA:n Suomen pääedustajan toimikausi päättyi, jolloin Päivi Saarinen samalla luopui tehtävästä. Paula Niinikorpi valittiin pääedus- tajan tehtävään uudeksi kolmivuotiskaudeksi.*

### Hyvät lukijat, estimataj,

*Pari viikkoa sitten UEA vahvisti Suomen pää- edustajansa vaihdoksen. Tällöin minut valit- tiin tähän tehtävään. Monet tuntevatkin minut jo Esperantoliiton (EAF) ja Suomen nuorten esperantoliiton (FEJO) aktiivina ja hallitusten jäsenenä. Yhtä innokkaana otan vastaan myös tämän uuden ja haasteellisen tehtävän. Olen käytettävissä UEA:han liittyvissä asioissa ja kysymyksissä. Samalla myös peranto- eli vä- littäjäasiat siirtyivät vastuulleni. Tästä eteen- päin UEA:lle välitettävät jäsenmaksut, kong- ressimaksut ja -tilaukset sekä lehtitilaukset ja muut maksut tarpeidenne mukaan hoituvat kauttani. UEA-maksuja varten on uusi tilin- umero, josta ilmoitus tämän viestin ohessa. Mi- nut tavoittaa parhaiten sähköpostiitse tai puhe-*



**Paula Niinikorpi. Foto: RB**

*limitse. Yhteystietoni löytyvät Esperantolehden sivulta 2. Haluaisin vielä tässä yhteydessä kiit- tää Päivi Saarista tähänastisesta toimikaudesta ja hyvästä perehdytyksestä tehtävään.*

Antaŭ kelkaj semajnoj UEA konfirmis la ŝanĝon de finnlanda ĉefdelegito. Tiam mi elektigis en la taskon.

Multaj el vi konas min jam de aliaj funkcioj ĉe EAF kaj FEJO. Mi tamen entuziasme akceptas ankaŭ ĉi tiun novan taskon.

Mi estas je via dispono en aferoj kaj demandoj lige al UEA. Ankaŭ la peranto-aferoj apartenas al mia taskaro. Ekde nun mi zorgas pri la UEA-membrotizoj, kongresaj aliĝoj kaj mendoj, gazetoabonoj kaj aliaj pagoj al UEA

laŭ viaj bezonoj. Por ĉi tiuj pagoj estas nova kontonumero, pri kiu estas anonco lige al ĉi tiu mesaĝo.

Mi atingeblas plej certe per retroŝto aŭ telefono. Miaj kontaktinformoj estas sur la paĝo 2.

Mi volus ankoraŭ danki la antaŭan ĉefdelegiton Päivi Saarinen pro la ĝisnuna oficperiodo kaj pro bona transdono de la tasko.

*Paula Niinikorpi*



**Karaj finnlandaj esperantistoj,**

Post 12 jaroj estas nun tempo por mi lasi la ĉefdelegitecon kaj transdoni la torĉon al Paula. Mi scias ke ŝi plenumos la taskon diligente kun entuziasmo kaj ĝojo.

Mi deziras al Paula sukceson en ŝia nova laboro kaj dankas al la finnlanda esperantistaro pro kunlaboro kaj kompreno.

*Amike via,  
Päivi*

**Päivi Saarinen**

## Uusi tili UEA-maksuille – Nova bankkonto por pagoj al UEA

*UEA-maksuille on uusi tilinumero:*

*FI44 5630 4550 0426 25 (UEA/EAF Paula Niinikorpi).*

*Viestikentässä voit ilmoittaa maksun aiheen kuten tähänkin asti. Välittäjä-asioihin liittyen voit ottaa yhteyttä Paula Niinikorpeen, jonka tavoittaa sähköpostitse osoitteella paula.niinikorpi@gmail.com tai puhelimitse numerosta 040 527 4821.*

*Tuttuun tapaan tilin kautta hoituvat jäsenmaksut UEA:lle, kongressi-ilmoittautumiset ja -tilaukset, lehtitilaukset ja muut maksut tarpeidenne mukaan.*

Por pagoj al UEA estas nun nova bankkonto. Ties numero estas FI44 5630 4550 0426 25 (UEA/EAF Paula Niinikorpi).

Kiam vi pagos ion al la konto, bonvolu informi en la mesaĝkampo la motivon de la pago. Vi povas ankaŭ kontakti Paula Niinikorpi per retroŝto, *paula.niinikorpi@gmail.com* aŭ telefone 040 527 4821 lige al la pagoj.

Kiel kutime, eblas pagi membrokotizojn, kongresajn aliĝkotizojn kaj mendojn, gazetoabonojn kaj aliajn pagojn laŭ via bezono tra ĉi tiu konto.



# Somera kurso – Kesäkurssi, Rauma 15.–18.6.2017

## PROGRAMO (provizora) – OHJELMA (alustava)

**Merkredo-keskiviikko 14.6.:** Antaükursa renkonto kaj vesperumo. *Kurssia edeltävä tapaaminen ja illanvietto.* Tiuj, kiuj povos veni al Rauma jam merkrede, renkontiĝos en la urbo kaj ekzemple manĝos kune. *Tapaaminen ja mahd. yhteinen illallinen niille, jotka saapuvat Raumalle jo keskiviikkona.*

**Ĵaŭdo-torstai 15.6.:** Malfermo de la kurso, la instruistoj kaj gelernantoj prezentas sin, grupiĝo.

**9.00** *Kurssin avaus, opettajien ja opiskelijoiden esittäytyminen. Jakautuminen ryhmiin.*

**9.30** Instruado. *Opetusta* (2 h)

**11.00** Kafo. *Kahvi.*

**11.30** Instruado. *Opetusta.* (2 h).

**13.00** Ekiro al la urbo por lunĉo. *Lähtö lounaalle.*

**14.30** Rondirado piede en la malnova urbo por konatiĝi al la lokoj. *Kävelyä vanhassa kaupungissa paikkoihin tutustuen*

**15.30** Reveno al la kursejo, kafo kaj instruado. *Paluu kurssipaikalle, kahvi ja opetusta* (2 h).

**17.00** Paŭzo kaj libera tempo. Eblas vizitiasian loĝejon. *Tauko ja vapaa-aikaa. Majoituspaikoissa käynti tarpeen mukaan.*

**19.00** Vespermanĝo. *Illallinen.*

**Vendredo-perjantai 16.6.:**

**9.30** Instruado. *Opetusta* (2 h)

**11.00** Kafo. *Kahvi.*

**11.30** Instruado. *Opetusta.* (2 h).

**13.00** Lunĉo en la urbo. Poste butikumado kune. *Lounas ja ostoksilla käyntiä.*

**14.30** Vizito en la preĝejo. *Tutustuminen Rauman kirkkoon.*

**15.30** Reveno al la kursejo, kafo kaj instruado. *Paluu kurssipaikalla, kahvi ja opetusta* (2 h).

**17.00** Paŭzo kaj libera tempo. *Tauko ja vapaa-aikaa.*

**19.00** Vespermanĝo. *Illallinen.*

**Sabato-lauantai 17.6.:**

**9.30** Instruado. *Opetusta* (2 h)

**11.00** Kafo. *Kahvi.*

**11.30** Instruado. *Opetusta.* (2 h).

**13.00** Lunĉo en la urbo. *Lounas.*

**14.00** Vizito en la urba muzeo. Butikumado kune. *Tutustuminen Rauman museoon. Ostoksilla käyntiä.*

**16.30** Kafo en la kursejo, poste paŭzo. *Kahvi kurssipaikalla ja tauko.*

**18.00** Komuna vesperumo kaj manĝo. *Yhteinen illanvietto ja illallinen.*

**Dimanĉo-sunnuntai 18.6.:**

**9.30** Instruado. *Opetusta* (2 h)

**11.00** Kafo. *Kahvi.*

**11.30** Instruado. *Opetusta.* (1 h).

**12.30** Informoj kaj fermo de la kurso.

*Ilmoituksia/tiedotuksia ja kurssin päätös.*

**13.00** Lunĉo en la urbo. Adiaŭaj vortoj.

*Lounas. Päätöspanat.*

**14.00** Transporto al busoj laŭbezono.

*Kuljetus tarpeen mukaan linja-autoasemalle.*

Alproksimiĝas la somero kaj nia somera kurso en Rauma. Ĝis nun aliĝis ok personoj kaj kelkaj aliaj interesiĝis pri partoprenado. En tiu ĉi gazeto vi vidas la tagan programon.

La kurso komenciĝos merkrede per komuna vesperumo por tiuj, kiuj alvenos jam tiam. Ĵaŭde matene 15.6. ni kolektiĝos je la 9-a en la kursejo por oficiala malfermo. La kursanoj

estas dividitaj en grupojn laŭ ilia lingvoscio: komencantoj lernos kaj ripetos la unuajn aferojn kaj la aliaj lernos plu ĉefe diskutante. Ĉiuj konatiĝos unu kun la alia kaj ĉiuj estas instruotaj aŭ gvidotaj de ĉiuj instruistoj Fejfi, Tuomo, Sylvia kaj Tiina.

Ĉiutage ni havos 2–5 lernohorojn en la klasĉambro, sed grava parto de la lernado okazos en praktikaj situacioj en butikoj kaj muzeoj de la urbo. Ni lunĉos kaj vespermanĝos kune ĉiutage kaj nature tiam diskutas Esperante.

Kursokotizoj: 90 € (tuta kurso) aŭ 30 € por tago. Tio enhavas la materialon de la instruistoj kaj kafon/teon kun manĝaĵeto en la kursejo ĉiutage. Aliajn manĝojn kaj muzeajn vizitojn ĉiu pagos mem same kiel tranoktadon. Aligante bonvolu informi kiom da tagoj vi partoprenos. Vi povos pagi la kotizon aŭ kontante aŭ al la konto de EAF (vidu la finlingvan tekston aŭ informiĝu ĉe Tiina).

Se vi ankoraŭ ne aliĝis, faru tion nun. Ju pli frue ni ricevos informojn pri la kursanoj, des pli bone ni povos plani la kurson. Informiĝu kaj aliĝu al sekretario de EAF:

*Tiina Oittinen, eafsekretario@esperanto.fi*, tel. +358-50-5494709. Informojn pri kurso-praktikaĵoj, i.a. pri tranoktado en Rauma, donas ankaŭ *Tuomo Grundström, tuomo.grundstrom@gmail.com*, tel. +358-440-199766.

*Kesä ja Rauman kesäkurssi lähestyvät. Tähän mennessä on ilmoittautunut kahdeksan henkilöä ja moni muukin on ollut kiinnostunut. Esperantokurssimme paikka on Vanhan kansalaisopiston talo vanhassa kaupungissa (Vähäkoulukatu 8), mistä pääsemme hyvin liikkeelle eri puolille vanhaa ja uudemmaa kaupunkia. Opiskelemme siis sekä luokkahuoneessa että käytännön tilanteissa kaupungilla ja tutustumme sen nähtävyyksiin ja myymälöihin.*

*Kurssikaupunkiin voi tulla jo keskiviikkona ja viettää yhteisen illan niiden kurssilaisten*

*kanssa, jotka silloin ovat paikalla. Torstaiaamuna aloitamme kurssipaikalla klo 9.00 ja jaamme opiskelijat sopiviin ryhmiin esim. alkat, jatkoalkajat, jatkajat, keskustelijat. Päivittäin on 2–5 oppituntia luokassa ja saman verran kaupungilla. Lounaan ja illallisen nautimme yhdessä sopivissa paikoissa. Tässä lehdessä on päivittäinen ohjelma.*

*Kurssimaksut: 90 € (koko kurssi) tai 30 €/päivä. Maksuun sisältyy opettajan materiaali sekä kahvi/tee sopivan kahvileivän kanssa kurssipaikalla päivittäin. Muut ruokailut, museoiden pääsymaksut ja muut kulut sekä majoituksen kukin hoitaa itse.*

*Ilmoittaudu mahdollisimman pian EAF:n sihteerille: Tiina Oittinen, eafsekretario@esperanto.fi, puh. 050-5494709. Häneltä saat myös lisätietoja kurssista. Mitä aikaisemmin tiedämme kurssin osallistujat, sitä paremmin pystymme suunnittelemaan sen sisältöä. Kursikäytännöistä ja Raumaan liittyvistä asioista, mm. majoittumisesta, antaa tietoa Tuomo Grundström, tuomo.grundstrom@gmail.com, puh. 0440-199766.*

*Kurssimaksun voi maksaa joko käteisellä paikan päällä tai viimeistään 10.6. mennessä Suomen Esperantoliiton tilille FI82 5721 1520 2859 38, viitenumero 4666 (viestikohtaan ei tietoa maksusta, koska silloin pankki veloittaa liitosta suuremman pankkimaksun saapuvasta rahasta). Ilmoittakaa Tiinalle kummalla tavalla maksatte, kiitos.*

*Bonvenon al Rauma! Tervetuloa Raumalle!*

*Tuomo, Fejfi, Sylvia kaj Tiina*



**Fejfi**

## D-ro Zamenhof forpasis antaŭ cent jaroj, 1917

Varsovio vokis al la Jubilea Kongreso 1959. Tiam ekestis mia forta scivolemo pri Ludoviko Zamenhof kaj lia familio. Pasis jam 58 jaroj, sed mia entuziasmo neniel velkis. Feliĉe mi havas hejme abundan presitan materialon kaj krome la reto proponas sian helpon.

La mortotago de la kreinto de Esperanto estas la 14-a de aprilo. Mian animon trankviligas la studado pri la fazoj de Zamenhofoj. Povas esti, ke iuj el miaj trovaĵoj interesas ankaŭ aliuojn. Miaj ŝatataj gvidantoj estas *Wendy Heller* kaj *Zofia Banet-Fornalowa*. Ne eblas ĉi tie mencii ĉiujn gravajn nomojn.

La ĉerkon de doktoro Zamenhof survoje al la Juda tombejo ĉe la Okopowa-strato akompanis granda homamaso. Multaj povraj okulpacientoj apartenis al la procesio. Ilin nia konata oftalmologo ofte kuracis tute senpage. La fama poeto *Antoni Grabowski* parolis ĉe la tombo: "La lingvo benata montriĝis al ni, mirinda donaco ĉiela. La ombroj de nokto forkuras el mond."

Veran klasikaĵon verkis *Roman Dobrzyński* titolitan "La Zamenhofstrato", kiu aperis en

Litovio 2003. Iuj ne ŝatas nomojn de urbopartoj kaj stratoj, kiuj al mi plaĉas. Kelkfoje mi aventuris en la pola metropolo, tiun libron en la mano. Ĝi estas efika kaj funkcia urba gvidilo, kiu klarigas ankaŭ la historian fonon de la zamenhofsia familio. Lidia estis la plej fervora adepto de la internacia lingvo Esperanto inter la familianoj.

Indas dum la festojaro de Finnlando ripete legi kaj studi pri la kvintesencaj eroj de la movada historio. Iel plej interesa biografio estas *Doktor Esperanto* de *Maria Ziolkowska* origine verkita en la pola lingvo. Paralelan tradukon en Esperanton interpretis *Isaj Dratwer* akurate kaj laŭvorte. Tiel la leganto povas iomete gustumi pasive slavan lingvon.

Estas multaj eblecoj konatiĝi kun la Zamenhofsia lingvo kaj kun la parenkaro de la Majstro. Tia studado kuraĝigas min kaj plifortigas mian vivofadenon. Aliĝu al la rondo de studemuloj.

*Jorma Ahomäki*

### Estimataj!



*Leteroj de  
Ludoviko Zamenhof*

Okaze de la 100-a morto-datreveno de Ludoviko Zamenhof ni skanis kaj publikigis 19 originalajn korespondaĵojn de Ludoviko Zamenhof. Ili estas libere kaj senpage legeblaj sur la retejo de la Esperantomuzeo kaj de la Kolekto por Planlingvoj: [www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/arkivajoj/](http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/arkivajoj/)

Laŭpove ni estontece skanos kaj publikigos pluajn malnovajn arkivaĵojn el la Esperantomuzeo en Vieno.

Korajn salutojn kaj bondezirojn,

*Bernhard Tuidier*



# La vivoverko de Zamenhof daŭre inspiras, 100 jarojn post lia morto

La 14-a de aprilo 2017 estas la 100-a datreveno de la morto de Ludoviko Zamenhof, iniciatinto de Esperanto. En tiu ĉi solena tago, Universala Esperanto-Asocio ree substrekas la gravecon kaj daŭran valoron de lia vivoverko, pri kiu eblas nun legi en trideko da lingvoj ĉe la nova reĝejo [www.zamenhof.life](http://www.zamenhof.life).

”Zamenhof ne nur havis genian intuicion pri lingvoj,” komentas d-ro *Mark Fettes*, la prezidanto de UEA. ”Li ankaŭ sukcesis vortumi, interalie per siaj kongresaj paroladoj, kernan etikan vizion por la Esperanto-movado. Temas pri la konvinko, ke la kunvenado kaj kunparolado de ‘homoj kun homoj’ estas ne nur praktike utila sed ankaŭ spirite profunda paŝo al interkompreniĝo.”

Ludoviko Zamenhof naskiĝis en 1859 en mezklasa juda familio en Bjalistoko, urbo tiam situanta en la okcidenta parto de la Rusa Imperio. Jam ekde sia adoleska aĝo li komencis eksperimenti pri la kreo de neŭtrala lingvo. Finfine en 1887 en Varsovio aperis la Unua Libro pri la Lingvo Internacia de d-ro Esperanto. Dum la sekvaj 25 jaroj Zamenhof, kune kun sia edzino Klara, dediĉis grandan parton de siaj tempo, energio kaj financaj rimedoj al la flegado de la frua movado. Li vaste korespondis, redaktis revuojn kaj librojn, aŭtoris artikolojn kaj poemojn, tradukis verkojn de la monda literaturo kaj ekde

la unua Universala Kongreso en 1905 prezentis ankaŭ serion de inspiraj kongresaj paroladoj. Estas eksterdube, ke lia konstanta, senlaca kaj saĝa agado tra tiuj ofte malfacilaj jaroj estis nepra por la stabiligo de la lingvo kaj ĝia komunumo.

”Kune kun sia etika vizio, Zamenhof obstine tenis sin al la ideo, ke Esperanto apartenas al ĉiuj siaj parolantoj,” aldonas Fettes. ”Malsame ol multaj aliaj planlingvaj aŭtoroj, li dekomence serĉis manieron fordoni sian gvidan rolon. Tial li reagis tre pozitive al la fondo de UEA en 1908, ĉar li prave vidis, ke la movado bezonas komunan tegmentan organizon en kiu ĉiuj esperantistoj povas kunlabori, sendepende de siaj naciecoj kaj siaj diversaj ideoj tendencoj. Liaj ideoj kaj lia ekzemplo restas inspiraj por ni ankoraŭ hodiaŭ.”

Okaze de la centa datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, en 1959, Unesko rekonis lin kiel unu el la Grandaj Personecoj de la Homaro. Ankaŭ ĉi-foje, lia mortodatreveno estas listigita de Unesko inter la notindaj datrevenoj de la jaro 2017. Agante laŭ tiu instigo, la pola parlamento la 7-an de aprilo aklame akceptis rezolucion pri la signifo de lia vivoverko. Solenaĵoj, simpozioj kaj aliaj datrevenaj eventoj okazados tra la mondo ĝis la jarfino; kalendaro troveblas ĉe [www.gazetaro.org](http://www.gazetaro.org).

GK 680

## Antaŭenin kevätretki pe 26.5.2017

Kaikki kiinnostuneet tervetuloa mukaan kokeilemaan osuuko pieni golfpallo reikään. Paikka on Vaihmalan hovi Lempäälässä, josta saa vuokrata mailan ja palloja. Ohjelmassa on myös yhteinen lounas. Varaa edellä esitettyihin asioihin 20–25 €.

Tapaamme klo 11 Lempäälän rautatieasemalla, josta sitten jatkamme Vaihmalan Hoiviin (Valkeakosken tietä nro 3041, sitten Vaih-

malantie 144). Lempäälään pääsee sekä junalla että bussilla, ja rautatieasemalta on tarvitsijoille kuljetus.

Ole hyvä ja ilmoita osallistumisestasi (ja kuljetustarpeestasi) alla olevaan puhelimeen.

Tervetuloa!

Tapani 050 5245 823,  
Sylvia 050 3214 313



# Mia Mirinda Mediteranea Esperanto-Semajno 2017

La flugo de Helsinki per *Norwegian* daŭris 3½ horojn. La vetero estis suna kaj klara, ni vidis la neĝkovritajn Alpojn sub ni. Kelkaj nuboj kovris la valojn. Fluginte pli suden ni vidis la senneĝajn malhelajn sudajn deklivojn kaj poste la maron, bluan kiel la ĉielo. Ni flugis laŭ la marbordo okcidenten ĝis Nico. Tie mirigis min, ke la flughaveno kuŝas flanke de la maro. Neniujn remparojn aŭ murojn mi vidis. Ĉu la ondoj ne ŝprucas sur la kurejojn de aviadiloj?

Ĉe la haltejo "Kisu kaj flugu", france markita DEPOSE MINUTE, min atendis miaj novaj geamikoj *Jean-Francois* kaj *Cathy Cousineau* en sia blanka *Renault Clio*. Unu-kaj-duonhora veturado tra belegaj verdaj florantaj pejzaĝoj en plena sunbrilo laŭ aŭtovojoj ne tro blokita de trafiko al mi ŝajnis kiel fabelo. Mi ne povis kredi miajn okulojn kaj mian bonŝancon. Ĉio aspektis nekredinde. Plurfoje mi diradis: Mi sentas min en fabela mondo!

Ni alvenis al *Issambres*. Atendis nin agrabla lunĉo en la memserva restoracio de la hotelo *Vacanciel*. Por finno la manĝoj estis ekzotaj kaj frandaj. Ankaŭ la tempo rezervita por la manĝado estas ampleksa, kaj ĉion kronas la fruktoj, kukoj kaj aliaj desertoj. Tamen finno ŝatus trinketi kafon kun sia kuko, sed la franca kutimo estas eventuale aĉeti tason da kafo ekster la restoracio, kaj tie kukoj ne vendatas. Ĉiutage la manĝoj estis variaj kaj frandaj kaj la vino senpaga.

Mi ne tuj komprenis, kiu kurso/grupo plej taŭgus al mi. Fine mi elektis la grupon (malpli ol 30 personoj) de *Marek Blahuš*, ĉar en ĝi mia malbona aŭdo ĉe tre ĝenis. Li lerte uzis sian komputilon ebligante al ni vidi/legi liajn



La kunveno

instruataĵojn. Tion mi ege aprezis. Facile li vidigis erojn el la enkomputilaj vortaro, maparo kaj bildaro, helpante siajn studentojn kiel eble plej bone sekvi lian instruadon. Ŝajnis, ke la tuta grupo ĝuis la lecionojn. Oni ofte ridis. La laborhoroj estis 9.15–12.15, 18.00–19.00 kaj prelegoj, filmoj aŭ aliaj distraĵoj post 20.30. Ni vidis ekzemple belegan duhoran bildaron pri Vjetnamio, kiu estis kvazaŭ filmo, prezentojn pri la ĉeĥa urbo *Brno*, germana urbo *Schweirin*, pri *Dali* kaj impresionismo, pri malsimileco de la lingvoj litova kaj Esperanta. Pro malbonŝancaĵoj teknikaj mi havis nur 10 minutojn por rakonti pri Finnlando.

Kelkajn horojn mi pasigis en la grupo de la instruistino *Dalia Pileckienė*. Ĝi estis pli granda, kvardeko da lertaj esperantistoj. Ĝuste tiam ili konkursis pri turo-konstruado. La materialoj estis kartonaj teleroj, balonoj, pinĉiloj, plastaj "pajloj", glubendo, rubando, tondilo. Ĉiuj multe interkonsiliĝis, parolis, amuziĝis en bona etoso. Mi admiris la instruistinojn, kiu scias elpensi varian instruprogramon profite al la studentoj, kiuj jam "ĉion scias".

Dum ekskurso al arbaro kaj supren laŭ longaj deklivoj mi konstatis, ke neniun planton mi en tiu klimato konas krom la herbon. Mi ŝatis haltadi kaj fotadi. Krome, se mi ne haltadis, mi perdis la spiron, miaj koro kaj pulmoj ne kutimiĝas al longaj deklivoj, ĉar mi ja loĝas en ebena lando. Pro tio mi kaj unu belgino iom postrestis kaj perdiĝis. Fine ŝi haltigis aŭton kaj la ŝoforino afable veturigis nin al la hotelo, sed dume la tuta grupo maltrankvile atendis kaj serĉis nin. Mi hontas, ke ni kaŭzis grandan ĝenon, sed mi ankaŭ atentigas, ke la gvidantoj pli bone zorgu pri eksterlandanoj kaj malrapiduloj.

Ni ekskursis al Ĉokoladifesto, kie mi lernis pri la kultivado de kakao-arboj, pri la farado de kakao kaj ĉokoladaĵoj. En alia tago ni busis al la vilaĝo *Cogolin*, kie ni konatiĝis kun la malnova urbocentro kaj pipfarado. La pipojn oni faras el dika radiko de mediteranea specio de erikoj, kiu estas eĉ 2 metrojn alta arbusto kun blankaj floroj. Ĉar fumado multe

malpliigiĝis en Eŭropo, la pipfabrikantoj elpensis aliajn vendotaĵojn, spicomuelilojn, pletojn, trinkujojn, bovlegojn, statuetojn, ĉiajn suvenirojn. La pipoj estas eksportataj ĉefe al orienta Eŭropo kaj fora Azio.

Revenante al la hotelo mi fotis la vesperajn lumojn trans la golfeto. Ankaŭ tio estis bela fabela momento. Ĉiumatene mi iris al la strando por vidi la sunon leviĝi. Mi kolektis strobilojn kaj ŝtonetojn. La grandaj pinkonusoj tre plaĉis al mi. En Finnlando unu tia ĉe floristo kostas 1–2 €, oni uzas ilin por floranĝoj. Bedaŭrinde mi ne havis multe da loko por kunportaĵoj en mia dorsosako. Tial nun Francoj bruligas la al mi ekzotajn strobilojn en siaj kamenoj pro la bonaodoro.

Mia MES entute kostis ĉ. 600 €. El tio la flugokostoj estis ĉ. 130 €.

*Salute  
Raita*

## Jarkunvenaj decidoj

La estraro elektita en la jarkunveno 4.3.2017: Prezidanto estis reelektita *Tuomo Grundström*, en la estraro restas duan jaron *Robert Bogen-schneider*, *Tiina Kosunen* kaj *Paula Niinikorpi*, reelektitaj por la jaroj 2017–2018 *Arja Kuhanen*, *Tiina Oittinen* kaj *Päivi Saarinen*, elektitaj kiel vicestraranoj por 2017 *Tapani Aarne*, *Börje Eriksson* kaj *Miamaria Saastamoinen*.

La jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando dum Vintraj Tagoj en Helsinko decidis ne altigi membrokotizojn de la Asocio. Jen scioj pri la kotizoj por la jaro 2017: 22 € individua membro (inkl. Esperantolehti-gazeton), kaj 44 € Societo Nino Runeberg por pli subteni la asocion. Abonprezo de Esperantolehti por membroj de la membroasocioj (kluboj) 16 €.



Osmo Buller

## Esperantistoj en loka demokratio

La 9-an de aprilo estis balotago de municipaj konsilantaroj en Finnlando. *Osmo Buller*, emeritiĝinta ĝenerala direkto-

ro de UEA, reveninta al sia hejmloko, norda *Taivalkoski* eniris en la konsilantaron. *Tuomo Grundström* estis elektita vice en *Rauma*. *Jukka Pietiläinen* estis kandidato en la urbego *Vantaa* apud *Helsinki*. Ĉiuj kandidatis por Maldekstra Alianco.

## Preferata lando kaj flago senlanda

Estis unu el la unuaj belaj printempaj tagoj en marto. Mi decidis promeni al certa kafejo por trinki la posttagmezan kafon. Post iomete da promenado mi venis al la granda vendoplaco de nia urbo. Nun ne estis multaj vendistoj, ankaŭ ne klientoj aŭ aliaj homoj en la placo. Estis nur kamioneto de kiu oni povas aĉeti kafon kaj aliajn trinkaĵojn por trinki starante aŭ por kunpreni. Ĉar ne estas seĝoj en ĉi tiu "kafejo", mi ne intencis trinki mian kafon tie. Antaŭ la kamioneto estis reklamŝildo kun tri flagoj, unu trikolora al kiu mi iukiale ne donis plian atenton, la dua estis la finnlanda kaj la tria estis ruĝ-flave striita kun bildo-figuro en la mezo. Do mi, por vidi la figuron, disigis la flagon kiu flirtis en la facila vento antaŭ miaj okuloj. Kiam mi rigardis en la direkton de la vendisto kiu staris antaŭ la kamioneto, li esperplene atendante marĉandon diris la komencajn vortojn: (en la finna: *Kaunis lippu!*) "Bela flago!". Mi respondis: "Jes, mi scias ke estas la hispana flago, sed mi neniam rigardis de proksime la figuron en la mezo". Kaj mi kontinuus: "Ĉu vi estas hispano?" Kun unu vorto li respondis: (en la finna: "Lempimaa!") "Plej ŝatata lando!". Do mi komprenis ke li ne estis hispano, krome lia akĉento montris ke li ankaŭ ne estis finno. Mi jam divenis ke la lando de kiu li devenis estas nia kara orienta najbarlando.

Ĉar la beleco de io estas en la okuloj de kiu vidas... mi kontinuus la diskuton dirante ke mi preferas flagojn kun malmultaj koloroj kaj klare videblaj, eventualaj figuroj. Ĉar mi estas el generacio kiu ankoraŭ memoras la Sovetunian tempon, en mia menso jam trapasis bildo de flago kun serpo kaj martelo kaj flagoj kun ruĝa stelo, mi momenteton cerbumetis ĉu ili estas belaj? Kaj fakte mi rapiddecidis ke mi ilin ŝatas!

Tamen tiam la vendisto diris: "Fakte ni devus havi multajn flagojn, ĉar la aŭto estas itala, la kafejo estas sveda, la pano estas franca..." Tiam mi respondis: "Sed fakte ja unu flago sufiĉus, ĉu vi scias...?" Li kapneis, do mi demandis: "Ĉu vi aŭdis pri Esperanto?" Denove kapne. Tiam

mi komencis klarigi pri kio temas kaj metis mian saĝtelefonon por montri la Esperanto-flagon. Feliĉe mi tuj trovis ĝin kaj montrante ĝin, la vendisto demandis kiun landon ĝi reprezentas. Mi pliklarigis ke temas pri internacia lingvo sed ankoraŭfoje li volis scii kiu estas la lando de tiu flago. Post plia klarigo mi pensas ke li iomete komencis kompreni. Mi ankoraŭ volis montri esperantan tekston kaj malfermis la paĝojn de *La Ondo de Esperanto*. Kaj mi surklakis "Rusa literaturo en Esperanto" kaj videbligis eĉ ruslingvaj nomoj de la rusaj verkistoj. Krome mi informis ke tiu gazeto estas eldonata en Kaliningrado. Nun mi nur esperis ke li ne pensas ke la verda stel'-flago apartenas al Kaliningrado, post tia ekspresa informo pri la internacia lingvo!

Sed nun venis kelkaj soifaj homoj kaj ĉar mi ne volis trinki mian kafon ĉi-tie, mi adiaŭis kaj promenis antaŭen. Mi estis feliĉa ke mi nun faris plibonigon de la mondo plenuminte la esperantistan devon, nun almenaŭ unu homo pli en Finnlando estas klera, sciante almenaŭ iomete pri Esperanto.

Post kelkaj tagoj mi denove pasis la moveblan kafejon, do mi pensis ke mi iomete parolu kun la vendisto. Sed nun jam alproksimiĝis kelkaj aliaj homoj, mi rapide nur demandis ĉu li memoras la nomon de la lingvo pri kiu ni parolis? Lia mallonga klara respondo estis: "Vladimir!"

Mi ne povis ne ridi en mi mem pro la tute ne atendita rapida respondo. Feliĉe venis novaj klientoj kaj mi forpromenis. Eble li ne tute komprenis mian demandon aŭ li volis reciproki al la propagandisto de Esperanto kiu altrudis al li tiel komplikan aferon kiel flago sen lando. Se la preferata lando de la vendisto estas Vladimir, ĉu L. aŭ P. mi ne scias, mi devas demandi venontfoje kiam mi iros al la vendoplaco. Kaj tiam mi ankaŭ aĉetos kafon, ja temas pri justa komunikado! Ĉar mia preferata lando estas tiu de flago kun verda stel'.

*Börje Eriksson*

# Syyspäivät, Aütunaj Tagoj 9.–10.9.2017



Fotoj: [www.metsakouluntie.com](http://www.metsakouluntie.com)

Aütunaj Tagoj okazos ene de naturo, en loko kiu situas proksime de la urbo *Forssa* (ĉ. 30 km). La ejo nomiĝas *Eräkeskus Liesjärvi* kaj tie eblas kaj vagadi en la naturo kaj havi etajn prelegojn kaj amuzan kunestadon kun amikoj. Manĝoj kaj tranoktado estos surloke favorpreze, kaj transporto tien aranĝiĝos de la busstacio de *Forssa*. *Forssa* estas vojkrucio; tien trafikas tre oftaj busoj el ĉiuj urboj. Pliaj informoj aperos en sekva Esperantolehti, sed notu jam la semajnfino: la 9-an kaj 10-an en septembro 2017.

*Syyspäivät* ovat paikassa nimeltä *Eräkeskus Liesjärvi*, noin 30 km *Forssasta*. *Eräkeskus* sijaitsee nimensä mukaisesti luonnon helmassa,

*joten ohjelmassa on niin pienimuotoista luonnossa vaeltamista kuin mukavaa yhdessäoloa. Ehkä kuulemme myös pienen luennon luonnonihmeistä. Kuljetus Forssan Matkahuollosta järjestetään tarpeen mukaan, ja risteyskaupunki Forssaan on tiheät yhteydet kaikista kaupungeista. Majoitus ja ruokailut ovat Eräkeskuksessa edulliseen hintaan. Lisätietoja seuraavassa Esperantolehdessä, mutta merkitse jo viikonloppu 9.–10.9.2017 kalenteriisi.*

Vidu retpaĝon / katso verkkosivua  
<http://www.metsakouluntie.com/>

*Bonvenon! Tervetuloa!  
Estraro de EAF*

## Eino Leino (1878–1926) kaj Halina Weinstein (1902–1942)

Ofte miaj pensoj nune flugas malantaŭen. Estas tute kompreneble, kiam mi jam estas 85-jara. Antaŭ proksimume dek jaroj turkuana grupeto vizitis Varsovon. Tiam mi ricevis de sinjorino *Banet-Fornalowa* donace la verkon *LA PEREINTOJ IN MEMORIAM*. Temas pri fragmentoj el la juda historio. Indas mencii unu poemeton el la libro.

Finnoj bone konas sian grandan poeton *Eino Leino*, kies kapabla tradukistino estis ĝuste *Halina Weinstein*. Volonte mi prezentas unu ekzemplon pri la bela kaj majstra traduklaboro de la pola poetino Weinstein. La origina fina teksto titoliĝas *SYYSTUNNELMA*, traduki-

te *AÜTUNA AGORDO*. Legantoj de Esperanta Finnlando mem komparu kaj admiru la korean kapablon de ambaŭ menciitaj poetoj. La poemo aperis 1897 en la kolekto “*Kaprimulgo*”.

### Syystunnelma

Teit oikein ystävä ainoo  
kun luotani läksit pois  
Sun rintasi nuori ja lämmin  
mun rinnalla jäänynt ois.

### Aütuna agordo

Ĝuste faris vi solamikino  
Ke Vi fine foriris de mi:  
Via koro la juna kaj varma  
Ĉe la mia fariĝus glaci.

*Jorma Ahomäki*

## Literumiloj kaj ortografia kontrolado en Esperanto

Lingvoilo (LanguageTool) estas liber-koda plur-lingva programo por kontroli la ortografion, gramatikajn erarojn kaj stilon de Esperantaj tekstoj. Ĝi funkcias ankaŭ por pluraj aliaj lingvoj. "Lingvoilo" atentigas ankaŭ pri eraroj ne trovitaj per simpla literuma kontrolilo.

Estas avantaĝo de Lingvoilo, ke oni povas uzi la programon ne nur en ĝia retejo, sed oni povas elŭti kromaĵojn (suplementan aldonan programeton) por sia retumilo. Post la instalado sufiĉas nur marki iun tekston per la muso, kaj la kromaĵo povas tuj indiki la eventualajn literumajn aŭ gramatikajn erarojn... (!)

Prizorganto kaj programisto de Lingvoilo estas *Dominique Pelle*. - Dankon al li!

Adreso de Lingvoilo: <https://languagetool.org/eo/>

Ekzistas ankaŭ du aliaj, bone funkciantaj literumiloj kaj kontroliloj de ortografio:

- Lingvohelpilo ĉe <http://visl.sdu.dk/lingvohelpilo/>
- Esperantilo ĉe [www.esperantilo.org](http://www.esperantilo.org)

Lingvo-Studio, L.S.  
[www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu)



## Stipendioj haveblaj

Fondumo Esperanto donas stipendiojn por vojaĝoj al Esperantaj kongresoj kaj aliaj internaciaj Esperanto-renkontiĝoj. Stipendiojn povas ricevi unuavice du grupoj de finlandaj esperantistoj:

- gejunuloj;
- instruistoj de Esperanto, kiuj celas plibonigi sian lingvan aŭ instruistan kompetenton.

Sendu vian petleteron al la prezidanto de la Fondumo, *Jouko Lindstedt* ([jouko.lindstedt@professori.fi](mailto:jouko.lindstedt@professori.fi)). Limdato por petleteroj ne ekzistas.

Priskribu en la petletero, pri kia renkontiĝo temas kaj por kiaj kostoj vi petas subvencion (veturado, loĝigo, kongresa kotizo). Gejunuloj indiku sian naskiĝjaron. Instruistoj de Esperanto estas petataj ankaŭ priskribi, kiel la renkontiĝo utilis por la plibonigo de ilia lingva aŭ instruista kompetento.

*Jouko Lindstedt*  
Prezidanto de la estraro  
Fondumo Esperanto-säätiö

## Vizito en la muzeo de Wäino Aaltonen en Turku

Kursanoj studentajn Esperanton en la Civitana instituto de Aurala vizitis kun la urbaj ĉiĉeronoj *Leena Tiusanen* kaj *Tiina Oittinen* la muzeon de *Wäinö Aaltonen*. Gvidado okazis Esperante kaj finne.

En la granda ekspozicio temas pri Wäinö Aaltonen kaj pri la jubilea jaro de la sendepedeco de Finnlando. La verkoj de la granda artisto, ĉefe skulptaĵoj, estas multflanke prezentitaj kaj en alia parto oni rakontas pri lia vivo. Ni volis speciale vidi proksime la orajn statuojn, kiuj estis faritaj en 1932 por la nova parlamenta domo en Helsinki,



En la muzeo, fotis: oficistino de la muzeo

antaŭ ol ili revenos al iliaj originalaj lokoj en la sidejo de la deputitaro. Oficistino de la muzeo afable fotis nian grupon.

*Tiina Oittinen*

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperanto-lehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti [eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi).**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. [www.esperanto.fi/helsinki](http://www.esperanto.fi/helsinki)  
[jukka.pietilainen@helsinki.fi](mailto:jukka.pietilainen@helsinki.fi) (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530  
[onni.kuappinen@gmail.com](mailto:onni.kuappinen@gmail.com)
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 044 953 4454  
[kimmo.hannula@creavit.fi](mailto:kimmo.hannula@creavit.fi),  
[www.esperanto.fi/jyvaskyla](http://www.esperanto.fi/jyvaskyla)
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala [www.esperanto.fi/oulu](http://www.esperanto.fi/oulu)  
[aini.esp@hotmail.com](mailto:aini.esp@hotmail.com)
- ♦ Esperantoseura Antaüen r.y. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere [www.esperanto.fi/tampere](http://www.esperanto.fi/tampere) (Tapani Aarne: [tapani.aarne@mbnet.fi](mailto:tapani.aarne@mbnet.fi)  
☎ 050 5245 823)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhankatu 26 A 11, 20100 Turku. [tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi) ☎ 050 549 4709
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. [sylvia.h@kolumbus.fi](mailto:sylvia.h@kolumbus.fi)  
☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- ♦ Näkövammaisten esperantoyhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki.  
☎ (09) 660 651 [steleto@pp.inet.fi](mailto:steleto@pp.inet.fi)
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.  
[fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi). Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 € tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 € sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 €. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). [bovoeo73@gmail.com](mailto:bovoeo73@gmail.com).

Esperanton harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Hyvinkäällä, Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella.

Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta, ks. hallituksen yhteystiedot sivulla 2.

## ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna  
aperas dum la jaro

# 2017

Nro	Limdato	Aperas
3/2017	31.5.	en junio
4/2017	1.9.	en septembro
5/2017	15.11.	en decembro

### Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulko puoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 €	1/1sivu/paĝo 50 €
1/2 sivu/paĝo 60 €	1/2 sivua/paĝo 30 €
1/4 sivu/paĝo 40 €	1/4 sivua/paĝo 20 €

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redakto:

[eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi) aŭ poŝte al la oficejo:  
Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65,  
00530 Helsinki.





Posti Green

## La aprila numero de la revuo Esperanto elŝuteblas senpage

Kadre de la festado de la Zamenhof-Jaro, la unua numero de la redaktoroj *Dima Ŝevĉenko* kaj *Anna Striganova* estas libere elŝutebla de la retejo [revuoesperanto.org/senpage\\_aprila\\_numero](http://revuoesperanto.org/senpage_aprila_numero) dum la tuta monato aprilo.

La redaktora paro jam arde pretigas la majan numeron; se vi volos legi ankaŭ ĝin kaj ĉiujn numerojn aperantajn en la jaro 2017, vi povas

aboni la revuon rekte aŭ aliĝi al UEA ĉe: *uea.org/alighoj/alighilo*. Se vi ŝatus helpi ke la revuo kaj la revua retejo estu laŭeble plej interesaj kaj buntaj, sendu viajn rekomendojn kaj kontribuojn al [revuoesperanto@gmail.com](mailto:revuoesperanto@gmail.com)

[laŭ GK 677]

## Kelkaj eventoj viziteblaj ekster Finnlando

Dato	Aranĝo	Loko (Lando)	Kontakto
12.–14.5.	36-a Pola Esperanto-Kongreso	Bjalistoko (PL)	<a href="http://kongreso.hol.es/eo/">kongreso.hol.es/eo/</a>
18.–22.5.	Interkultura Majrendevuo	Vroclavo (PL)	<a href="mailto:informado.eo@gmail.com">informado.eo@gmail.com</a>
2.–5.6.	94-a Germana kaj Eŭropa Esperanto-Kongreso	Freiburg (DE)	<a href="http://www.esperanto.de/gek2017">www.esperanto.de/gek2017</a>
23.–25.6.	76-a Hispana Esperanto-Kongreso	Teruel (ES)	<a href="http://www.esperanto.es/kongreso">www.esperanto.es/kongreso</a>
1.–8.7.	53-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET)	Liepāja (LV)	<a href="http://www.esperanto.lv">www.esperanto.lv</a>
15.–23.7.	Somera Esperanto-Studado (SES) 2017	Banská Štiavnica (SK)	<a href="http://ses.ikso.net/2017">ses.ikso.net/2017</a>
30.9.–7.10.	25-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo	Tossa de Mar (ES)	<a href="http://kulturacentro.blogspot.com.es">kulturacentro.blogspot.com.es</a>

### Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy kesäkuussa. Aineisto 31.5.2017 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en junio. Artikoloj ĝis 31.5.2017 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: [efgazeto@esperanto.fi](mailto:efgazeto@esperanto.fi).